

Volume 3

February, 1908

Number

PER COPY 10 CENTS

PER YEAR \$1.00

# Amerika Esperantisto

A Monthly Magazine of the  
International Language

# ESPERANTO

IN THIS NUMBER

GRAMMAR, VOCABULARY AND  
ELEMENTS OF THE LANGUAGE



American Esperantist Company

1239 Michigan Avenue

CHICAGO

Copyright, 1908, by American Esperantist Company

Digitized by Google

# AMERIKA ESPERANTISTO

Entered as second class matter June twenty eight nineteen hundred and seven at the post office at Chicago, Illinois

Monata Revuo de la Lingvo  
Internacia

A Monthly Magazine of the  
International Language

Redaktoro kaj Administranto ARTHUR BAKER Editor and Manager

## ABONOJ

Unu numero, Sd. 20; jarabono, Sm. 2.05. Ni ne disdonacas provajn ekzemplerojn, sed postulas, ke ĉiu, kiu mendas ekzempleron, por kia ajn celo, pagu por tiu sama. Eksterlandanoj povas sendi aŭ internaciajn kuponojn aŭ naciajn poŝtmarkojn por provaj abonoj.

## TARIFO DE REKLAMADO

*Proportie al disvendado*, niaj prezoj estas la plej malkaraj el ĉiuj revuoj esperantaj. Largo de kolonoj, 63 mmj; longo, 204 mmj.

Plena paĝo, Sm. 20.50; duonpaĝo, Sm. 10.25; kvaronpaĝo, Sm. 5.15; malpli ol kvarono, po 7 spesdekoj ĉiun metromilonon.

## MANUSKRIPTOJ

pri ia ajn temo, estas danke ricevataj kaj zorge legataj. Tiujn, kiujn ni ne povas uzi, ni ĉiam resendos, se oni kunmetis poŝtmarkojn.

## SUBSCRIPTIONS

Single number, ten cents; annual subscription, \$1.00. We do not distribute free sample copies, but require that every person who orders a copy, for whatever purpose, shall pay for it. For sample copies, foreigners may send international coupons or national postage stamps.

## ADVERTISING RATES

*In proportion to circulation*, our rates are the lowest of all Esperanto magazines, throughout North America; width of column, 2 1/2 inches; length, 8 inches.

Full page, \$10.00; half page, \$5.00; quarter, \$2.50; less than quarter, basis 6 cents per agate line—14 lines to the inch.

## MANUSCRIPTS

on any subject are gratefully received and carefully read. Those which we cannot use we shall always return, when accompanied by postage.

AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO 1239 Michigan Avenue CHICAGO

## LA PROGRAMO

La celo de *Amerika Esperantisto* estas: unue, disvastigi la lernadon de Esperanto, lingvo internacia, tra Nord-Ameriko; due, vigligi la popolan intereson je la lingvo per la publikigado de bona literaturo, novaĵoj el la kampoj de Esperanto, de la scienco, kaj la intereso de la homa vivo. Nia sintenado pri ĉiuj la diversaj demandoj pro kiuj la Hieraŭo kaj la Morgaŭo interbatalas, ĉiu postulante, pli malpli juste, la aliĝon de la Hodiaŭo, estos ĉiam de la flanko de la Morgaŭo. Ĉar nenio estas pli multvalora ol tago venonta; nek io tiel senvalora, kiel tago jam pasinta. Tial, ni respektas nenian homan institucion pro tio, ke ĝi estis; nek pro tio, ke ĝi estas; sed sole pro tio, ke ĝi povos servi al la homaro en la estonteco.

Laŭ nia programo, unu numero el ses estos speciale propaganda, redaktita plimulte anglalingve. La seriaj paĝnumeroj ne aperos sur la anglaj paĝoj, pro tio, ke multaj ne dezirus bindi ilin kune kun la esperantaj, kaj ni mem konsideras ilin kiel ne integran parton de la tuto, kiune estas angla, sed Esperanto. Anoncojn ni akceptas, ĉu angle ĉu esperante presatajn, kaj tradukas senpage.

## OUR PROGRAM

The purpose of *Amerika Esperantisto* is: first, to diffuse the study of Esperanto, the international language, throughout North America; second, to sustain popular interest in the language by the publication of good literature, and news from the fields of Esperanto, science, and interesting matters of human life. Our position on all the various questions over which Yesterday and Tomorrow are battling, each claiming, with more or less of right, the allegiance of Today, will always be on the side of Tomorrow. For nothing is so worthy as a coming day, nor anything so worthless as a day already gone. Therefore, we respect no human institution because it *was*, nor because it *is*; but solely because it may serve mankind in the future.

According to our program, one number out of six will be especially devoted to propaganda, mostly English. The page numbers are omitted from English pages, as many do not wish to bind them with the Esperanto, and we consider them as not an integral part of the whole, which isn't English, but Esperanto. Advertisements we print in English or Esperanto. Translation free.

## LA FANFARONULO

Laŭ vera rakonto de unu usona pioniro verkis CHARLES E. BAKER

Meze de tago en la aŭtuno de 1884, grupeto da spekulaciistoj kun termezuristoj kaj termezura helpantaro elveturis per ĉevalveturiloj el David City en Nebrasko, kaj movis okcidenten al la proksima Ĉakto-indiana rezervaĵo, por elmezuri urblokon proksime de ĝia centro kuŝanta ĉirkaŭ kvindek mejlojn malproksime. Tiun rezervaĵon la indianoj estis antaŭ nelonge vendintaj al la Unuigitaj Ŝtatoj, sed ili estis ankoraŭ ne foririntaj de ĝi. Ili estis pacemaj al la blankuloj, sed la spekulaciistoj suspektis ĉiujn indianojn kaj nevolis ilin fidi; sekve, roto el la Nebraska ŝtata militistaro, kiun komandis Kapitano J. W. Fonson (*elparolu* Fan-s'n) akompanis la grupon por ĝin protekti.

Linio fervoja estis nove elmezurita tra la rezervaĵo sude de la Plat-rivero, sed ĝi estis ankoraŭ konstruota; kaj estis la intenco de la spekulaciistoj elmezuri la urblokon apud la linio kaj, kiam la fervojo konstruiĝos, esti ĉe la loko prete por vendi lotaĵojn al la unuaj venontoj.

En la komenco de la marŝo Henriko McDerny (*elparolu* M'k Derna) juna militisto, anoncis ke li intencas mortigi "la unuan malbenindan indianon" kiun li vidos. Ĉar tio estis laŭ lia bone konata kutimo de fanfaronado, kompreneble neniu lin kredis. Tiuj kiuj ja atentis tion, kion li diris, mokis lin kaj diris ke li forkurus pro indianino. Li respondis ke ili pli bone lernos pri tio

Kapitano Fonson diris al McDerny, "Junulo mia, vi devas tute ne fari tian faron. Nia celo ne estas ekbatali, sed simple protekti ĉi tiujn virojn tiom kiom ni povos en okazo de atako de la indianoj. Mi supozas ke vi nur ŝercas, sed se vi ja intencas tion, memoradu ke mi estas antaŭe avertinta vin."

LA FANFARONULO

Oni forigis tiun temon. Neniu indiano vidiĝis tiun posttagmezon, kaj vespere la tuta grupo haltis, starigis la tendaron en la alta herbo kaj ripozis tie ĝis la morgaŭa tagiĝo. En la nokto oni neofte veketis pro la blekado de latroj<sup>a</sup>, sed nenia alia interrompo okazis.

Nelonge post la mezo de la dua tago de la marŝo, la grupo alvenis vidproksime de la Plat-rivero. Plimulto de la viroj antaŭe vojaĝis sur la veturiloj, sed tiu ŝanĝo de la pejzaĝo vekis ilian atenton kaj granda nombro enhavanta McDerny desaltis por marŝi.

La Plat-rivero trafluas la vastan herbejon inter krutegaĵoj havantaj altecon de kvin ĝis sep metroj eltrancinte por si dum estintaj teraĝoj profundan kuŝujon pli larĝan ol ĝi povas ordinarare pleniĝi; sekve estas ebena, sabla spaco de okona mejlo laŭlarĝe, kuŝanta laŭlonge malsupre de la krutegaĵoj ĉiuflanke de la rivero. Tiujn spacojn kovras arboj: ulmoj, betuloj, moniliferoj, kaj ceteraj, kiuj ankaŭ staras supre sur la krutegaĵoj ĝis ĉirkaŭ dudek metroj de la rando post kie la tero ne sufiĉe malsekiĝas de la rivera akvo por kreskigi lignajn kreskaĵojn. La riveretoj simile laŭlonge havas arbaretojn, sed aliloke la herbejo sin kovras per herbejo tiel alta kiel la ŝultroj de viro.

Ĉe tiu speciala loko la rivero havas unu kilometron da larĝo kaj sudflanke de ĝi la spaco inter la akvo kaj la krutegaĵo estas nur malgranda.

Subite oni ekvidis du indianinojn sidantaj, fiŝkaptantaj sur ŝtupo kies unu fino kuŝis sur la krutegaĵo kaj la alia sub la akvo. Instante la paŭlo de McDerny leviĝis kontraŭ lian ŝultron. "Mallevu tiun paŭlon, McDerny!" la kapitano ekkriegis, sed tute vane; li pafis kaj unu el la virinoj defalis malviva en la akvon kaj forflosiĝis laŭ la fluo. La alia desaltis de la ŝtupo kaj alkuris supren ĝis post la krutegaĵo, kaj la blankuloj ne poste vidis ŝin.

<sup>a</sup>Malgranda ano de la gento lupa; amerike, *coyote*—"kajot".

## AMERIKA ESPERANTISTO

CHARLES E. BAKER

“Jen!” diris McDerny. “Mi estas mortiginta unu. Kiu nun diros ke mi ne agas laŭ mia vorto?”

La kapitano rigardis lin momente kaj tiam kviete diris al li, “Juna viro, vi bedaŭros tion—vi eltrovos ĝin la plej kostema afero kiun vi iam faris.”

“Nu, mi pensas ke ne. Ili ne kuraĝos kontraŭi nin—ili tro timas antaŭ tiuj ĉi grandaj pafiloj.”

Tiamaniere McDerny, kiu estis kore timulo, pensis fondi reputacion de braveco. Estas ankaŭ tre kredeble ke li deziris harstarigan historion en kiu li povus ludi rolon de heroo por rakonti kiam li reiros hejmen. McDerny estis nesagaŭlo. Malkresku lia gento.

Oni ne vidis aliajn indianojn. Je la tria la vojaĝantaro alvenis ĉe ronda altetaĵo havanta sepdek metrojn da larĝo kaj du metrojn da alto, kaj tie haltis, decidinte ke tiu estas tro taŭga ripozloko por forlasi ĝin tiel malfrue en la tago. Krome la ĉevaloj estis lacaj. Oni metis la veturilojn en rondon ĉirkaŭ la centro de la altetaĵo, kaj starigis la tendojn en alian rondon ĉirkaŭ la veturilaro, sur la rondo de la altetaĵo.

La soldatoj starigis la pafilojn en la centro, kaj tiam komencis ludi kartojn, ŝerci, rakonti historiojn, kaj amuzi sin laŭ diversaj manieroj. La suno jam subiris kaj la vespera krepusko mallumiĝis; en la diversaj manĝotendoj la vespera manĝo estis en preparado; la militoficiroj, la spekulaciistoj, la termezuristoj, ilia helpantaro, kaj kelke da soldatoj, unu el kiuj estis McDerny, sin trovis en unu tendego, kiam ekstere stranga voĉo elvokegis, “He!” Eksteren rigardante oni vidis rondon el indianoj tute ĉirkaŭanta la altetaĵon kun brilantaj pafiloj levitaj.

Tio estis al la blankuloj plena surprizo, kaj la indianoj elektis precize la oportunan tempon por ĝi, ĉar jam estis sufiĉe da mallumo por kaŝi ilian alvenon, kaj la noktogardistoj estis ankoraŭ ne okupintaj siajn lokojn.

## LA BIRDO EN LA NEĜO

Novelo de Palacio Valdes. El la hispana lingvo tradukis  
OTTO HAUX MAYER

Li estis blinda de sia naskiĝo. Oni estis instruinta lin pri la solo, kion la blinduloj kutimas lerni, la muziko, kaj li estis lertega pri tiu ĉi arto. Lia patrino mortis malmultajn jarojn post kiam ŝi donis la vivon al li; lia patro, ĉefo de regimenta orkestro, antaŭ nur unu jaro. Li havis fraton en Ameriko, kiu ne sendis sciigojn pri si; tamen li aŭdis alipere, ke li estas edzigita, havas du tre belajn infanojn kaj posedas bonan oficon. La patro, dum li vivadis, plena de indigno pro la nedankemeco de la filo, ne volis permesi, ke oni elparolu lian nomon, sed la blindulo konservis por li multan sindonemecon; li ne povis ne memori, ke tiu frato, pli maljuna ol li, estis lia apoganto dum la infaneco, la defendanto de lia malforteco kontraŭ la atakoj de la ceteraj knaboj, kaj ke li ĉiam parolis al li afable. La voĉo de Santiago, kiam li eniradis matene en lian ĉambron kaj diris: "Ho he, Joĉjo, leviĝu do, ne dormu tiom longe!" sonis en la oreloj de l' blindulo pli agrabla kaj harmonia ol la klavoj de l' fortepiano kaj la kordoj de l' violono. Kiel koro tiu bona ŝanĝiĝis en malbonan? Johano ne povis konvinkiĝi pri tio kaj serĉis por li milionon da senkulpigoj; foje li atribuis la kulpon al la poŝtoj; alifoj li imagis al si, ke lia frato ne volas skribi, ĝis li povos sendi multon da mono; ankoraŭ li pensis, ke li donos al ili surprizon dum iu estonta tago, prezentante sin kiel milionulo en la modesta duonalta etaĝo, kie ili loĝadis; sed neniun el tiuj ĉi ideoj li kuraĝis sciigi al sia patro; nur kiam tiu ĉi, koleriĝinte, ĵetis ian maldolĉan riproĉon kontraŭ la forestantan filon, li kuraĝis diri al li: "Mi petas, patro, ne malesperu; Santiago estas bona; la koro diras al mi, ke li skribos unu baldaŭan tagon."

## LA BIRDO EN LA NEĜO

La patro mortis, ne vidinte leteron de sia pli maljuna filo, inter unu pastro, kiu lin admonis, kaj la malfeliĉa blindulo, kiu konvulsie premis lian manon, kvazaŭ li devus reteni lin perforte en tiu ĉi mondo. Kiam oni volis forporti la kadavron el la domo, li trapasis barakton frenezan, teruran, kun la helpantoj de l' procesia zorgisto. Fine li restis sola, sed kia soleco estis la lia! Nek patro, nek patrino, nek parencoj, nek amikoj; mankis al li eĉ la suno, la amiko de ĉiuj kreaĵoj. Li pasigis du tagojn, metita en sian ĉambbron, trakuradante ĝin de unu angulo al la alia kiel enkaĝa lupo, ne gustumante nutraĵon. La servantino, helpate de kompatema najbarino, prosperis fine malhelpi tiun memmortigon; li ree komencis manĝi kaj ekpasigis nun la vivon preĝante kaj ludante la fortepianon.

La patro iom antaŭ sia morto atingis, ke oni donis al li oficon de orgenisto en unu Madrida preĝejo, pagitan per dek-kvar realoj (=1.05 spesmiloj) po tago; kompreneble ĝi ne estis sufiĉa por subteni apartan mastraĵon, kiel ajn modestan; tial post la unuaj du semajnoj nia blindulo vendis por kelkaj spesdekoj, certe tre malmultaj, la malluksan meblaron de sia loĝejo, maldungis la servantinon, kaj iris kiel kliento al familia gastejo, pagante ok realojn (=60 spesdekoj); la ses ceteraj (=45 spesdekoj) sufiĉis al li, por zorgi la aliajn bezonojn. En la daŭro de kelkaj monatoj la blindulo vivis, ne irante al la strato, krom por plenumi sian devon; de la domo preĝejon, kaj de la preĝejo domen. La malĝojeco lin superadis kaj premegis tiamaniere, ke li apenaŭ malfermis la lipojn; li pasigis la horojn, verkante grandan rekviemon, kiun li esperetis oni ludos, dank' al la kompatemeco de l' pastro, por soleni la animon de lia mortinta patro; kaj kvankam oni ne povis diri, ke li havas la kvin sentojn metitaj en sian laboron, ĉar mankis al li unu, tamen ni diros, ke li fordonis sin al ĝi kun korpo kaj animo.

La ŝanĝo en la ministraro lin surprizis, kiam li ankoraŭ

OTTO HAUX MAYER

ne finis ĝin ; mi ne scias, ĉu eniris la radikaluloj aŭ la konservativuloj aŭ la konstituciuloj ; sed eniris kelke da novuloj. Johano ĝin eksciis nur malfrue kaj sub malutilo. La nova kabineto decidis post kelkaj tagoj, ke Johano estas orgenisto danĝera al la publika ordo, kaj ke, de l' alto de la ĥorejo, dum la vesperaj diservoj kaj solenaj mesoj, sonegante kaj bruante per ĉiuj registroj de l' orgeno, li faradas al ĝi vere skandalan kontraŭecon. Ĉar la eniranta ministraro ne estis inklina, laŭ tio, kion ĝi certigis en la parlamentó per la buŝo de unu plej aŭtoritata membro sia, "toleri trudemecojn de ĉiu ajn," ĝi tuj kaj kun bonefika energio eksigis Johanon, serĉante por li posteulon, kiu en siaj muzikaj manipuladoj prezentos pli da garantioj aŭ estos pli sindona al la regnaj institucioj. Kiam oni sciigis al li la eksigon, nia blindulo sentis nenian emociion, krom surprizo ; interne li preskaŭ ekĝojis, ĉar oni lasis al li pli da neokupataj horoj, por ke li povu fini sian meson. Nur tiam li ekkomprenis sian situacion, kiam en la fino de l' monato la mastrino aperis en la ĉambro, por postuli monon de li ; li havis neniom, ĉar li jam ne enspezis en la preĝejo ; estis necese, ke li garantidonis la poŝhorloĝon de sia patro, por pagi la loĝadon. Poste li restis ree tiel same trankvila kaj daŭrigis sian laboron, ne zorgante pri la estonteco. Sed denove venis la mastrino, kaj denove li sin vidis devigata fordoni garantie objekton el la tre malsufiĉa heredaĵo de l' patro ; estis diamanta ringo. Fine li havis jam nenion garantie donotan. Tiam, konsiderante lian malfortecon, ili konservis lin de ĝentileco ankoraŭ dum kelkaj tre malmultaj tagoj plu, kaj poste ili metis lin sur la straton, fanfaronante multe, ke ili lasas liberaj al li la kofron kaj la vestaĵon, kvankam per tiuj objektoj ili povus pagi sin por la malmultaj spescentoj, kiujn li ankoraŭ ŝuldas al ili.

Li serĉis novan loĝejon, sed li ne povis lui fortepianon, kio igis lin malĝojega ; li jam ne povis fini sian meson. An-



## AMERIKA ESPERANTISTO

### LA BIRDO EN LA NEGO

koratŭ li iris dum kelka tempo al la domo de amika magazinisto, kaj kelkafoje ludis fortepiane; tamen li baldaŭ observis, ke oni lin akceptas ĉiun fojon kun malpli da afableco, kaj li ĉesis iri tien.

Post malmulta tempo oni ĵetis lin el la nova domo, sed tiun ĉi fojon konservante la kofron kiel garantiaĵon. Tiam komencis por la blindulo periodo tiel malfeliĉa kaj turmentiga, ke malmultaj faros al si plenan ideon pri la doloroj, ja pli bone, pri la martiraĵoj, kiujn la sorto aljuĝis al li. Sen amikoj, sen vestaĵo, sen mono, certe oni status tre malbone sur la tero; sed se kun tio kuniĝas, ke oni ne povas vidi la sunlumon, kaj troviĝas pro tio ĉi nepre senhelpa, tiam la limoj de doloro kaj mizero estas apenaŭ distingeblaj. De loĝejo al loĝejo, forpelate de ĉiuj baldaŭ post la eniro, metante sin en liton, por ke oni lavu al li la solan ĉemizon, kiun li havis, kun disŝirita ŝuaĵo, kun franĝita malsupre pantalonon, nerazite, kun netranĉita hararo, tiel Johano vagadis tra Madrido, mi ne scias kiom da tempo. Per unu el la mastroj, kiujn li havis, homo pli kompatema ol la aliaj, li kandidatis oficon de fortepianisto en kafejo. Fine oni ĝin cedis al li, sed nur por maldungi lin post malmultaj tagoj; la muziko de Johano ne plaĉis al la klientoj de l' "Kafejo de la Hordeero;" li ne ludis kvadrilojn nek popolajn kantojn nek ian ciganaĵon nek eĉ polkojn; li pasigis la noktojn, interpretante sonatojn de Beethoven kaj koncertaĵojn de Chopin; la aŭskultantoj malesperetis, ĉar ili ne povis bati la takton per la kuleretoj.

Ree la malfeliĉulo ekvagadis tra la plej malpuregaj lokoj de la ĉefurbo. Iu kompatemulo, aŭdinte per okazo pri lia situacio, helpis lin malrekte, ĉar Johano tremegis je la ideo, ke li petu almozojn. Li manĝadis en iu drinkejo de la malaltaj kvartaloj tion, kion li nepre bezonis, por ne morti de malsato, kaj li dormadis por kelkaj spesdekoj inter almozuloj kaj krimetuloj en mansardo destinita por tio ĉi.

OTTO HAUX MAYER

Iuokaze oni stelis al li la pantalonon, dum li dormis, kaj lasis al li alian el dreliko flikitan. Estis en la Novembra monato.

La malfeliĉa Johano, kiu ĉiam estis konservinta en la menso la ĥimeron pri la alveno de sia frato, komencis nun ĝin nutri fervore, sub la premego de la mizero. Li skribigis Havanon, ne metante adreson sur la leteron, ĉar li ne sciis ĝin; li provis informiĝi, ĉu oni lin vidis, kvankam sen rezultato; kaj ĉiutage li pasigis kelkajn horojn, preĝante Dion surgenue, ke li alportu lin, por al li helpi. La solaj feliĉaj momentoj de la multe turmentita estis tiuj, kiujn li pasigis preĝante en angulo de iu izola preĝejo. Li kaŝis sin post kolono, enspirante la odorojn akrajn de l' vakso kaj la malsekecon. Li aŭskultis la kraketadon de l' kandeloj kaj la religian murmuradon de la malmultaj kredantoj, kiuj disidid tra la navoj de l' templo. Lia senkulpa animo forlasis ĉi tiun mondon, kiu lin traktis tiel kruele, kaj flugis por fordoni sin al Dio kaj Lia Sankta Patrino. Li havis de l' infaneco la respektagon antaŭ la Virgulino profunde enradikigitan en la koro; ĉar li apenaŭ konis sian patrinon, li serĉis instinkte en tiu de Dio la karesan kaj amplenan protektadon, kiun nur la virino povas doni al la infano; li estis komponinta por ŝia laŭdo kelkajn himnojn kaj preĝaĵojn, kaj li neniam endormiĝis, ne kisinte piege la de l' Virgulino skapularon, kiun li portis sur la kolo.

Tamen venis unu tago, kiam la ĉielo kaj la tero lin forlasis. Forpelite de ĉie, ne havante pecon da pano levotan al la buŝo, nek vestaĵon por ŝirmi sin kontraŭ la malvarmeco, la mizerulo komprenis kun teruro, ke alproksimiĝas la momento por peti almozon. En la fundo de lia animo komenciĝis batalo plena de malespero; la doloro kaj la honto refuzegis paŝo post paŝo la lokon al la mizero; la mallumo, kiu ĉirkaŭis lin, faris tiun ĉi batalon ankoraŭ pli turmenta. Fine, kiel oni ja povis antaŭvidi, venkis la malsato.